# Ekzercoj por Venus' la fina venk' . --- Sceno kvin

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la kvinan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

| | |
|---|---|
| 1. dilemo -------------------- | A. aŭdaca, signifa, abrupta |
| 2. projekto -------------------- | B. baro, malhelpo |
| 3. propagando -------------------- | C. detala plano kun specifa rezulto |
| 4. radikala -------------------- | Ĉ. elektronika muzik-instrumento |
| 5. inaŭguro -------------------- | D. malatento |
| 6. neglekto -------------------- | E. malaveraĝo |
| 7. obstaklo -------------------- | F. materialo aŭ agado por konvinki homojn |
| 8. sintezo -------------------- | G. problemo kun du eblaj solvoj el kiu oni devas elekti |
| 9. ekstremo -------------------- | Ĝ. rilate al la suba parto de planto |
| 10. ekscesa -------------------- | H. sencohava kunmeto |
| | Ĥ. solena malfermo |
| | I. tro multa |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Sceno-komence Aldo ekscitite anoncas ke...**
a) la nombro de esperantistoj superas 19 milionojn.
b) li havas freŝan ideon.
c) li ankoraŭ ne havas freŝan ideon.
ĉ) venis invito kandidatigi samideanon iri al Marso.

**2. Kiam Mart rapidlegas la kriteriojn li konstatas ke ____**
a) unuavice ili ŝajnas konvenaj.
b) la esperantistoj ne povas plenumi ilin.
c) estas fakte nur naŭ kriterioj.
ĉ) soldatoj plenumas ilin pli bone ol esperanistoj.

**Klari ne povas iri al Venuso ĉar _____**
a) ŝi ne povas forlasi siajn cent du lernantojn.
b) ŝi ne povas forlasi siajn du lernantojn.
c) Cseh-instruisto ne povas gesti, mimi, pupumi.
ĉ) ŝia pasporto jam elĉerpiĝis.

**4. Kiuj el la sekvaj ne konvinkis al Trev iri al Venuso?**
a) Li portos flagon por proklami la suverenecon de la esperantistoj.
b) Li povos disdoni varbilojn al la Venusanoj.
c) Mart prizorgos la disĵetadon de varbiloj dum la jarfesto.
ĉ) Unue oni devas instrui Esperanton al la Venusanoj, poste varbi ilin.

**5. La antonimo de “ekstrema” estas _____________.**
a) radikala
b) averaĝa
c) trema
ĉ) obskura

**6. La antonimo de “neglekto” estas _____________.**
a) atendo
b) atento
c) malatento
ĉ) nokto-vestaĵo

**7. Kiu el la sekvaj ne klarigas aŭ signifas simile al la radiko “aspir-”?**
a) streb-
b) klopod-
c) cel-
ĉ) la vira formo de medikamento kontrau kapdoloroj.

**8. “Datumo” estas ___________**
a) informo, kutime ciferece esprimita.
b) ekzemple, la 14an de aprilo, 1917.
c) dezert-oaza frukto kiu venas de palm-arbo.
ĉ) spac-veturilo per kiu oni iras al Venuso.

**9. “Sintezo” estas ______________**
a) frazoparto.
b) inteligenta kaj konciza kombino de ideoj.
c) mem-verkita eseo.
ĉ) malinteligenta miŝ-maŝo de ideoj.

**10. Mart diris ke la propaganda efiko de esperantisto sur Venuso estus enorma. Legnite la inviton, li komprenis tion __________**
a) tuj.
b) nur post longa tempo.
c) kiam Trev klarigis tion al li.
ĉ) tuj post la lego de la dek kriterioj.

### 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

| | |
|---|---|
| M O R P O R T A | ☐ __ __ ☐ __ __ __ __ |
| D R A K V E O | ☐ __ ☐ __ __ __ __ |
| N A JB A R R O L T E D O | __ __ __ __ __ __☐ __ __☐ __ __ __ |
| P I S T O M I M A | __ __ __ ☐ __ __ __ __ __ |

Virino Klari ne iros al Venuso, sed ne-ino iros.

Tiu decido estas __ __ __ __ __ __ __ .

### 4) DEMANDOJ

1. Kiu invito venas al la esperantistoj?
2. Kiel ili reagas al tiu invito?
3. Kiom da kriterioj estas? Por kiom maltaŭgas plenformita samideano?
4. Kio ekhavos sencon por Klari sur Venuso?
5. Kio estas PV kaj PIV? Kio estas la Cseh-metodo?
6. Kial Klari tamen ne volas iri al Venuso?
7. Kiun ŝi anstataŭe proponas? Per kiu argumento?
8. Kial tiu unue hezitas?
9. Kiujn argumentojn Mart uzas por tamen konvinki lin?
10. Mart diras "Esperantujo" kaj Miko diras "Esperantio". Kial la diferenco?

### 5) PARIGU

*Jen dek unu kriterioj por kandidatoj iri al Venuso. Ligu ilin kun la dek kvin idealaj faroj de samideanoj. Kompreneble, unu kriterio povas esti ligita kun pli ol unu ideala faro. Neniu diris, ke simpla estas la vivo.*

| | |
|---|---|
| 1. Sidi senmove dum horoj<br>2. Resti optimisma spite sortobatojn<br>3. Persisti kaj reprovadi spite obstaklojn<br>4. Sintezi ideojn apenaŭ kombineblaj<br>5. Komuniki kun eksterteranoj<br>6. Eleteni malaltajn temperaturojn<br>7. Elteni altajn temperaturojn<br>8. Krei solvojn el malkompletaj informoj<br>9. Elteni longegajn laborhorojn<br>10. Arigi kaj asimili obskurajn datumojn<br>11. El tiaj datumoj krei spirhaltigajn konkludojn. | A. Akceptigi proponon dum komitat-kunsido.<br>B. Deĵorado en la Centra oficejo<br>C. Deĵoro en surstrata inform-budo<br>Ĉ. Eldoni poemlibron.<br>D. Esti Cseh-instruisto.<br>E. Kompili membro-statistikon de UEA<br>F. Labortendaroj en Finnlando.<br>G. Labortendaroj en Maroko.<br>Ĝ. Partopreno en inaŭguroj de Universalaj Kongresoj<br>H. Partopreno en komitat-kunsidoj<br>Ĥ Ŝanĝi la statuton.<br>I. Trovi 17 milionojn da esperantistoj sur la tero<br>J. Uzi malnovajn eldonojn de PV kaj PIV<br>K. Verkado de jar-raportoj<br>L. Verkado de kongresaj rezolucioj |

***Kroma demando:***

*La origina teatraĵo havis dek postulojn. Ni havas dek unu. Kiel tio okazis?*

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**